

La vorto *que* en la franca kaj interlingua  
Claude Gacond, 212-a radioprelego, 1967.11.01 & 1967.11.04

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Cl.- Ĉiuj homaj idiomoj obeas al kelkaj fundamentaj mekanismoj. Kiam troaj vortaj simpligoj malebligas la distingon de la ĉefaj lingvaj strukturoj, tiam la uzo trudas regulojn, kiuj helpas eviti la plej gravajn miskomprenojn. Tiuj reguloj ŝajnas arbitraj al alilingvanoj.

A.- Sed ne ĉiuj troaj simpligoj kondukas al miskomprenoj. Kelkaj nur etigas la perceptadon de gramatikaj aŭ vortaraj nuancoj. Ĉiuj lingvoj konas tiajn simpligojn.

Cl.- Franclingvano studanta nelatinidan lingvon penas por traduki la vorton **que**, ĉar en la franca tiu vorto estas rezulto de troaj vortaj simpligoj. Li apenaŭ rimarkas studante la francan gramatikon, ke la vorto **que** plenumas diversajn rolojn, kaj ekstudante la germanan aŭ anglan, li miras, ke germanoj aŭ angloj bezonas tiom da vortoj nur por diri **que**.

A.- Jen anglaj terminoj, kiuj tradukas aŭ parte entenas la francan **que** : **that, than, as, if, whether, when, without, lest, may, let, yet, before, so...** por citi la ĉefajn.

Cl.- Lernante la germanan franclingvano renkontas la saman fenomenon kaj devas lerni distingi la nuancojn inter **welchen, welche, welches, den, die, das, was, warum, wie, welch, dass, damit, wenn, seit, ohne dass, als, nur, erst, dort, wo**, por povi traduki la francan **que**.

A.- La franca simpleco certe tentis la aŭtoron de esperanto. Tamen la observado de lingvoj tiom diferencaj, kiom povas esti la hebrea, la rusa, la pola, la germana, la franca, la latina, la greka, instruis al Zamenhof, ke se la germana kaj angla estas iom tro nuancemaj, la franca vere ne estas sufiĉe nuancema rilate al la vorto **que**.

Cl.- Por Zamenhof devas ekzisti tiom da terminoj, kiom da necesaj gramatikaj aŭ psikaj realaĵoj. Eksperimentado iom post iom indikis, kiuj gramatikaj aŭ ideaj nuancoj estas necesaj por ekzemple plej kontentige esprimi la vortojn, kiujn ni ĵus citis.

A.- Ni vidu la rezulton komparante esperanton kun la franca. Ni donu ekzemplojn pri la ĉefaj tradukoj de la franca vorto **que**.

Cl.- **Que** povas esti konjunkcio. Tiam ĝi esperantiĝas per **ke** aŭ per **ĉu...**, **ĉu**.

Mi pensas, **ke** ni devos longe atendi. – *Je pense **que** nous devons attendre longtemps.*

**Ĉu** sunos, **ĉu** pluvos, mi promenos. – ***Qu’il** fasse du soleil, **qu’il** pleuve, j’irai me promener.*

A.- **Que** en la franca povas esti prepozicio. Tiam ĝi esperantiĝas per **krom**.

Akvo, nenio **krom** akvo. – *De l’eau, rien **que** de l’eau.*

Cl.- La franca **que** povas esti speco de korelativo. Tiam ĝi esperantiĝas per **kia**.

Li estas tia, **kia** lia patro. – *Il est tel **que** son père.*

A.- La franca **que** povas esti adverbo. Tiam ĝi esperantiĝas per **kiel**, **kiom**, **ol** aŭ **nur**.

**Kiel** vi bonkoras! – ***Que** vous êtes bon!*

**Kiom** da perditaj horoj! – ***Que** d’heures perdues!*

Tuko pli blanka **ol** neĝo. – *Un drap plus blanc **que** la neige.*

Oni vivas **nur** unufoje. – *On ne vit **qu’une** fois.*

Cl.- Kaj fine la franca **que** estas ankoraŭ pronomo. Tiam ĝi esperantiĝas per **kiun**, **kiujn**, **kio**, **kion**.

Henry Dunant estas homo, **kiun** mi admiras. – *Henry Dunant est un homme **que** j’admire.*

Jen pentraĵoj, **kiujn** mi ŝatas. – *Voici des tableaux **que** j’aime.*

**Kio** okazas? – ***Que** se passe-t-il?*

La vorto *que* en la franca kaj interlingua  
Claude Gacond, 212-a radioprelego, 1967.11.01 & 1967.11.04

**Kion** vi faras ? – *Que faites-vous ?*

A.- Serĉante atente ni trovas aliajn francajn **que**. La franca lingvo tiom ŝatas tiun vorton, ke ĝi eĉ uzas ĝin sen neceso.

Militi estas frenezaĵo. – C'est folie **que** de faire la guerre.

Cl.- Nu, se ni komparas esperanton kun la franca, ni tuj rimarkas, ke estus granda malriĉiĝo blinde imiti la francan simplecon. Imagu, ke esperanto, simile al la franca, nur posedus la vorton **ke**, kaj vidu, kion ni obtenus. Ni rediras niajn ekzemplojn uzante nur la vorton **ke**.

A.- Mi pensas, **ke** ni devos longe atendi.

Cl.- **Ke** sunos, **ke** pluvos, mi promenos.

A.- Akvo, nenio **ke** akvo.

Cl.- Li estas tia, **ke** lia patro.

A.- **Ke** vi bonodoras !

Cl.- **Ke** da perditaj horoj !

A.- Tuko pli blanka **ke** neĝo.

Cl.- Oni vivas **ke** unufoje.

A.- Henry Dunant estas homo, **ke** mi admiras.

Cl.- Jen pentraĵoj, **ke** mi ŝatas.

A.- **Ke** okazas?

Cl.- **Ke** vi faras?

A.- Vi rimarkis, ke tiu uzo de **ke** estus ebla. Ĝi fakte ekzistas en la franca kaj ceteraj latinidaj lingvoj ; kial ĝi ne estus trudata al la internacia lingvo ? Tion pensas la naturalistoj. Pro tio en Interlingua la vorto **que** estas ĝemelo de la franca **que**.

Cl.- Ekzistas viroj, kiuj ne perceptas ĉiujn kolorojn pro gena kaŭzo. Por ili ruĝo aŭ verdo havas la saman valoron. Ne estas eble al ili distingi maturajn fragojn en verda foliaro. Ĉar bluo kaj flavo konfuziĝas en ilia kolorperceptado, la plej kolorriĉa sunsubira ĉielo perdas en la okuloj de tiuj daltonuloj la duonon de sia nuancaro.

A.- Rilate al la vorto **que** la francoj fakte estas intelektaj daltonuloj ! Dum ili vidas nur unu solan koloron, ni esperantistoj distingas, kaj bone distingas almenaŭ dekdu kolorojn.

Cl.- La homoj neniam akceptos etigi sian mondperceptadon. Pro tio malsukcesis multaj provoj vivi projektajn de internaciaj lingvoj. Esperanto ne limigas, sed vekas al nuancita penso. La vivpostuloj estas severaj. La lingvo internacia devas signifi progreson rilate al la naciaj lingvoj. Simpleco ne signifas kripliĝo.

A.- Zamenhof volis simplecon, kiu kondukas al racia pensado, al riĉiĝo de la parolrimedoj. Simpleco, kiu limigas, daltonigas, konfuzigas, fakte ne plu estas simpleco, sed komplikeco.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-